

Philippe Suchard (4) fondinto de ĉokolad-fabriko, la filantropo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-849/341, 1980 januaro 17 kaj 19
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-52/SRI-1980-52-A-2-341-849-1980-01-17-19-3a-en-80-Claude-kaj-Andree-Gacond-Philippe-Suchard-4-fondinto-de-ĉokolad-fabriko-La-filantropo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Kvaran elsendon ni dediĉas al la interesa vivo de Philippe Suchard, la fondinto de la ĉokolad-fabriko.

En sia libro "Rememoro pri Solferino" Henri Dunant, la iniciatinto de la filantropa organizo "Ruĝa Kruco" skribis:

A.- "Negocisto de la urbo Neuchâtel sin dediĉis dum du tagoj al la bandaĝado de vunditoj. Li skribis nome de la mortantoj adiaŭajn leterojn por la koncernaj familioj. Oni devis, por lia sanstato, moderigi lian aktivecon..."

Cl.- Tiu negocisto, kiu respondis jese al la help- Alvoko de Henri Dunant, diskonigita fare de la Evangelia Societo de Ĝenevo, estis Philippe Suchard, kiu tiam estis 62-jara.

A.- Alveninta en Milano Philippe Suchard skribis al Neuchâtel petante la sendadon de ĉarpio kaj sanitara materialo. Alia letero skribita la 9-an de julio 1859 en Desenzano tiel priskribas la militsituacion:

Cl.- "La korporema spektaklo de la transporto de la vunditoj daŭras. Tie ĉi la amputadoj okazas dum la tuta tago en la milit-hospitaloj. La plimulto de la preĝejoj transformiĝis al restadejoj por la vunditoj. Dum malpli ol duona horo mi ĵus vizitis pli ol 200 amputitoj. Jen kion krueleco, sovaĝeco eĉ, kapablis okazigi. Preskaŭ ĉiuj malfeliĉuloj havas plurajn vundojn. Aŭdiĝas nur plendoj kaj vekrioj. La amputojn oni faras per kloroformo: kvarono de la operaciitoj mortas."

A.- En sia helpa servo Philippe Suchard troviĝis subite meze de la milit-batalo, kiu renkontigis la armeojn de la aŭstra imperiestro Francisko-Jozefo kaj de la franca imperiestro Napoleono la tria. En letero datita de la 11-a de julio 1859 li skribis:

Cl.- "Dum kvin horoj ni troviĝis meze de la batala tumulto. Nia veturileto estis preskaŭ disrompita, sed ni mirakle eskapis."

A.- Post la armistico Philippe Suchard revenis en Neuchâtel por reokupiĝi pri sia sukerafejo kaj pri sia ĉokolad-fabriko en Serrières. Lian nomon oni ne trovas inter la fondintoj de Internacia Ruĝa Kruco, sed dekunu jarojn poste, kiam la milito de la jaroj 1870-71 alfrontigas la francajn kaj germanajn armeojn, oni retrovas Philippe Suchard en la duondetruita urbo Strasburg. Tiu sepdektrijara maljunulo malgraŭ ke estas vintre kaj danĝere, troviĝas inter la helpantoj de la Ruĝa Kruco.

Cl.- La vivo de Philippe Suchard havas plurajn menciindajn filantropajn trajtojn. Unu el ili estas la luktado kontraŭ alkoholismo. Jam sur sia vaporŝipo "La Industriulo" Philippe Suchard propagandis sian trinkaĵon el ĉokolado por lukti kontraŭ la trinkado de alkoholaĵoj. Tuj post la Ruĝa Kruco naskiĝis la Blua Kruco, kies celo estis la helpado al la alkoholemuloj kaj ties malfeliĉaj familianoj. Philippe Suchard farigis aktiva blukrucano.

A.- Sur herbejo ĉe la elirejo de la rivero el la kluzo "Gorges de l'Areuse" li konstruigis ĉaledon kaj plantigis ekzotajn arbojn. Kaj li invitis la promenemajn neŝatelanojn veni libere pikniki en tiu belega ripozejo, kie dimanĉe kaj dum la festotagoj la trinkaĵo el ĉokolado estis senpage ricevebla. Kiuj deziris ion pagi, tiuj povis meti monerojn en kaseton profite al la konstruo de promenvojo en la kluzo "Gorges de l'Areuse".

Cl.- Hodiaŭ de tiu ripozejo restas kiel memoraĵo imponaj cedroj, sekvojoj kaj aliaj ekzotaj arboj. La ĉaledo, kiu nomiĝis "Abstinemo" malaperis. Bedaŭrinde. Sed ankoraŭ nun bela promenvojo permesas admiru la kluzon de la rivero Areuse.

A.- Philippe Suchard, kiel ni jam menciis, devenas el malriĉa familio, kiu ĉion perdis en la incendio de la urbo La Chaux-de-Fonds la 5-an de majo 1794 kaj rifuĝis en la urbeton Boudry. La patro de Philippe Suchard fariĝis tie kafejestro. De tiu infaneco en kontakto kun la drinkuloj de la vilaĝo kaj kun mizerdramoj kaŭzitaj de alkoholismo Philippe Suchard konservis la tutan vivon filantropan reagon. Kiam lia ĉokolada fabriko komencis bonfarti, li dediĉis la profitojn al la konstruo ĉe la bordo de la lago de tuta vilaĝo por la personaro de la fabriko. Tiu urbo Suchard konsistis el domoj, kiujn ĉirkaŭis agrablaj ĝardenoj. Ĉiu familio havis je dispono kvar ĉambrojn, du subtegmentejoj, unu laborejon, unu kelon, unu lignoprovizejon kaj sufiĉe vastan ĝardenon. Komuna lavdomo estis je ĉies dispono. Kiam la lagobordo estis tute koloniita, Philippe Suchard entreprenis la koloniigon de aliaj lokoj, favorante la iom post ioman aĉeton de la domoj fare de la laboristoj luantoj.

Cl.- Tiu ĉi dom-konstruo por la personaro de la fabriko havis socian celon. Permesi al la familioj povi eduki la gefilojn en deca situacio, en kontakto kun la naturo kaj ne kun la mizero kaj alkoholismo, kiel tro ofte estis en tiu tempo en la laboristaj kvartaloj. Tiu iniciato de Philippe Suchard altiris la atenton de la aŭtoritatoj politikaj ĝis tre foraj lokoj.

A.- Alia iniciato de Philippe Suchard rilate al la bonfarto de la fabrika personaro estas menciinda. Ĝi ankaŭ havis grandan influon. En 1876 Philippe Suchard festis la kvindekan jaron de sia entrepreno kreante kolektivon asekuron kontraŭ la akcidentoj por la tuta personaro de la fabriko. Li estis inter la unuaj, kiuj enkondukis tian sekurecon en industria entrepreno.

Cl.- Fakte la dinamismo de Philippe Suchard, de lia junaĝo ĝis lia maljuneco celis la industriigon de la vivo pli pro idealo ol pro persona memriĉiĝo. Li kredis, ke industrio alportos riĉiĝon kaj bonfarton al ĉiuj. Tiurilate la legado de lia raporto pri vojaĝo en Usono, kiun li faris en 1824, montras lian admiron por la nova vivmodelo, kiun iniciatis la usonanoj. Tiun ĉi vivmodelon disvolvigis fakte Philippe Suchard pere de siaj multnombraj iniciatoj, kiuj ne ĉiam sukcesis: vaporŝipa navigado, industria bredado de silkoraŭpoj, mineja ekspluatado de asfalto kaj provo ĝin uzi por kovri la trotuarojn, korektado de la akvonivelo de la lagoj Neuchâtel, Murten kaj Biel kaj pliprofundigo de la riveroj kaj eĉ konstruo de kanaloj, kreo de bonfaraj societoj, inter ili la Ruĝa kaj Blua krucoj, kies celo estas lukti kontraŭ la militismo kaj alkoholismo, konstruo de promenvojoj en la naturo, ktp.

A.- Kiel ĝenerale la usonanoj, Philippe Suchard estis memfarita homo. Tiu aŭtodidakto observema kaj inventema dediĉis sian liberan tempon al vojaĝoj, pri kiuj li ofte raportas, kiel nun faras vojaĝ-raportistoj. Por doni al vi ideon pri tiu ĉi aspekto de la talento de Philippe Suchard, la venontan semajnon ni legos al vi traduke kaj konklude unu el liaj tekstoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond rakontis pri la neordinara vivo de Philippe Suchard. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*